# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

BAZAORGANIZAĴO DE ĈEA n-ro 5/1988 novembro 1988

Eli Urbanová

En arbaro

Vi tra arbaro iras nun
gvidata de la nazopinto.
Kaj pendas super labirinto
fantom' unika: Pala lun'.
Kaj perlas ŝvit' sub pelerin'...
Ĉu lup'? Fantome? Nur imago?
Jen aŭdu: Dum erarzigzago
embuske iu sekvas vin...
Konsterne vibras mort-intrig'
el flug' susura de vesperto...
En for' ululas kun averto
funebron profetanta strig' ...

Kastelo staras en proksim':
ĉielon tranĉas la konturo
de forlasita nigra turo,
ne logas tie homanim'.
Horloĝ' ekbatis per si mem -
Naĝante super kastelruboj
la lunon kovris grizaj nuboj
kaj ĉiu bat' - eltomba ĝem'.
Vin kuras frost': Dum noktomez'
aperos lum' en tura truo,
tambure klakos ostobruo,
skeletoj dancos en frenez'.

Okazu tamen kio ajn,
ne lasu ŝoki vin, vaganto,
la disonancoj de l' noktkanto
montriĝos baldaŭ trempa ŝajn'.

Vin la unua sunradi'
ankoraŭ nana, malkuraĝa,
denove faros sobre saĝa,
vi ridos eĉ pri l' komedi'.
Jes, mokos vi pri l' mortbrakum':
Vi ja ne estas timemulo!
(Al dorm' sin sternos en nebulo
fantomoj monstraj de mallum').

Kaj vere – cedas la krepusk',
arbar' vekiĝas el medito.
Purpure fajras amanito
en freŝe aspergita musk'.
Ornamas branĉojn perloj mil
kaj ŝpinas inter la piceoj
arĝentajn retojn aranĝoj,
vin akompanas birda tril'.
Arbaro vivas... Kun persisť
fagtrunkon garde frapas pego.
Kioma zorgo, kia flego
de la arbara kuracist'!

Vi haltas gape pro surpriz':
Sin fleksas ritme herba molo
sub la hufeť de kapreolo...
Domaĝe! Glutis ĝin kulis'...
La lastan pin-etaĝon ĵus
sciur' atingis akrobate.
Bivakas vi por miri flate,
sed vane petas pri konus'.
Vi sidas, eta hompigme',
rigardas supren al la alto -
Subite ve! Risorta salto!
Formikoj marŝas en arme'!

Mirteloj dolĉaj, fraga kamp'
konvenas al la apetito.
La sun' rapidas al zenito
brulante kiel granda lamp'.
Varmega tago! Kun diskreť
murmuras akvo en filikoj.
Sin svingis io sur silikoj:

Kolubron portas riveret'.
Vi ĝin postvadas kun envi',
ĝis panoram' de regiono
en la kvieta monotono
etende vastas antaŭ vi...

Dua premio en Oslo 1952
El "Verso kaj larmo"

---

Gravajn vivo-jubileojn en novembro kaj decembro ĉi-jara festos niaj membroj
Ing. Josef Kochman
Vlasta Burgetová
Marie Hrubcová
Jaroslav Mařík
Al ĉiuj ni deziras ĉion plej bonan, firman sanon kaj multe da feliĉo. La komitato.

---

La turista komisiito de nia klubo s-ano Rudolf Pleskot aligis nian klubon al la tutŝtata konkurso "Kufrování s Dominem". La konkurso estos tritaga: de la 27-a ĝis la 29-a de decembro 1988. Nia klubo partoprenos marde la 27-an kaj ĵaŭde la 29-an de decembro, merkrede la 28-an de decembro

partoprenos la klubo Aqualika.

La aranĝoj okazos en la antaŭhalo de la klubejo "Kodaňská" marde 27.XII.88 posttagmeze 12-18,00 h kaj en la klubejo "Vejvodova" ĵaŭde 29.XII.88 posttagmeze 12-18,00 h. Oni informos la partoprenantojn de la konkurso pri patriotoj, kiuj estis mortigitaj de nazioj (iliaj tabuloj troviĝas en stratoj Kodanská kaj Estonská) kaj gvidos ilin tra 10 kontrolpunktoj en la ĉirkaŭaĵo de la klubejo Vejvodova, kiuj rilatas al Esperanto. La gajnintoj ricevos malgrandajn premiojn.

Kunlaborantoj anoncu sin ĉe s-ano Pleskot.

---

Ĉeĥa Esperanto-Asocio aranĝas grandan societan vesperon kun kultura programo kaj dancamuzo vendrede la 2-an de decembro 1988 en la Kulturdomo Na Vartě de la 18-a ĝis la 23-a horo. La programo estos jena:

1. Koncerto de operkantistoj J. Vích kaj M. Smyčka
2. Recitado de lernantinoj ol Netolice
3. Nikolaa tombolo
4. Por dancado kaj aŭskultado ludos "Barbuloj".

Enirpago estos 15 Kčs + kontribuaĵoj por tombolo. Dum la vespero laborantoj de la ŝtata filmo filmos scenojn por la preparata mallonga filmo pri Esperanto. Per via ĉeesto vi helpos al la propagando pri Esperanto pere de la filmekrano.

Al la kulturdomo Na Vartě vi povas veni de la metroa stacio A "Strašnická" per aŭtobuso n-ro 271 aŭ el la stacio C "Kosmonautů" per aŭtobusoj n-roj 154 kaj 204. Elaŭtobusiĝo ĉe la stacio "Na Vartě", kiu troviĝas proks. 200 m de la kultur-domo.

Krimoj de la pasinteco J.O.

## NIGRA VENĜULO

"Se vi volas ĝisvivi morgaŭan vesperon, metu en koverton du mil kronojn, nokte la koverton metu en tombejo apud la lanterno sur la duan tombon dekstre de la enirejo. Ne pensu, ke ni skribas tion nur ŝerce. Ni scias, ke vi havas sufiĉe da mono. Se vi la monon ne donos libervole, ni venos por ĝi persone! Ne ludu kun ni! Se venus al vi ideo denunci, vi mortos en torturoj." Subskribo - Nigra Venĝulo.

Tiujn kelkajn liniojn el literoj trancîtaj el gazetoj jam kelkfoje legis maljuna sinjorino Vraná. La leteron sen poŝtmarko alportis matene poŝtisto. Ne tro volonte pagis la sinjorino sendkostojn, ĉar ŝi supozis, ke temas pri letero de ŝia filino, kun kiu ŝi ne estis en bona rilato. Sed post la malfermo kaj tralego de la letero ŝi ne sentis sin bone kaj devis sidiĝi en fotelon kaj vokis la servistinon.

"Mi rekomendas anonci ĉion al la polico," konsilis la servistino Bětka. Sinjorino Vraná petis unue voki kuraciston pro la subita kordoloro.

"Antaŭ la foriro la kuracisto al sinjorino Vraná ankaŭ rekomendis transdoni la leteron al la polico. Kaj tiel ankaŭ okazis.

"Estu trankvila," diris policisto Jakubec, kiu vizitis sinjorinon Vraná.

"Nigran Venĝulon ni certe kaptos. Donu la koverton, sed kun trancîtaj paperoj, sur la tombon laŭ la letero, kaj mi kun mia ĉefo gardos en la tombejo. Nia kolego estos kun vi hejme, se la kulpulo ŝanĝus la planon kaj volus veni ĉi tien.

Tiel ankaŭ okazis. Vespere estis sur la tombo la koverto, policistoj gardis en la loĝejo kaj en la tombejo.

Vespere komencis ne nur pluvi, sed ankaŭ fulmotondri. Policistoj kaŝitaj en arbustaĵo insultis, sed deĵoro estas deĵoro.

Fine ili ekaŭdis paŝojn kaj baldaŭ ekvidis ankaŭ staturon de viro. Ĉe la tombo li ĉirkaŭrigardis, prenis la leteron de sur la tombo kaj. ....

"En la nomo de la leĝo haltu, manojn supren aŭ mi pafos," vokis la policistoj. Nigra Venĝulo

ne atendis kaj rapide kuris for. Ne malproksimen. En la mallumo li stumblis kaj en tiu momento li havis katenon sur la manoj. Anstataŭ kontraŭstaro Nigra Venĝulo komencis plori.

Duan tagon venis sinjorino Vraná al policejo, kie ili promesis montri al ŝi Nigran Venĝulon. Kia surprizo! El la flanka pordo venis policisto kun delikvento. Sinjorino Vraná paliĝis, fermis la okulojn, policisto tuj kaptis ŝin kaj sidigis ŝin sur la seĝon kaj ŝi malrapide, mallaŭta diris: "Tio ja estas nia Otoĉjo!"

Dudekjara Oto estis nevo de sinjorino Vraná, filo de riĉa fabrikanto, filo de patrino, kiu lin dorlotis. Li havis ĉiam ĉion kion li deziris, ĉio estis al li pardonite. Kiam Oto estis pli aĝa, la patrino pagis liajn ŝuldojn, likvidis liajn societajn skandalojn. Tiel ŝi defendis lin antaŭ la patro.

Antaŭ nelonge la gepatroj eksciis, ke Oto havas ne nur amrilatojn kun servistino, sed ankaŭ ke la servistino atendas lian infanon. La serviskino postulis edziniĝi al Oto aŭ fari skandalon kaj ĉion transdoni al la tribunalo.

Oto estis forpelita de la gepatra hejmo. Li estis studento, pli bone dirite "eterna studento", nehavanta enspezojn, male grandajn elspezojn pro sia riĉa societa vivo. Li prunteprenadis monon kie ajn, sed foje li devis tiujn ĉi fontojn elĉerpi, kaj tiam li rememoris sian riĉan onklinon. Laŭ filmoj li elpensis venĝulon-ĉantaĝulon.

La tribunaio decidis kvar-monatan areston.

---

La programe de la kunvenoj de Esperantista Klubo en Praha por la plej proksima tempo:

| | | |
|---|---|---|
| 21-a de novembro 1988 | - Niaj poetoj Hromada kaj Lukáš | - E. Seemannová |
| 28-a de novembro 1988 | - Trarigardo de la Esperanto-gazetaro | - H. Štruncová |
| 5-a de decembro 1988 | - Superrigardo pri Aŭstrio | - J. Patera |
| 12-a de decembro 1988 | - Zamenhof-vespero | - J. Patera |
| 19-a de decembro 1988 | - Kristnaska vespero | |
| 2-a de januaro 1989 | - Trarigardo de la Esperanto-gazetaro | - H. Štruncová |
| 9-a de januaro 1989 | - 35-jarojn esperantisto | - J. Ondráček |
| 16-a de januaro 1989 | - Esperanto kaj speleologio | - K. Ryšánek |

La kunvenoj okazas ĉiulunde inter la 18.30 kaj la 20.30 h en la klubejo en Kodaňská-str.

---

Kun granda bedaŭro ni eksciis pri forpaso de nia membrino s-anino Fr. Welterová. S-ano Mařík skribis pri ŝi: Mi ne povas forgesi ŝian sindonan, longtempan (kaj por la aliaj preskaŭ nevideblan) laboremon, dum la epoko de s-ano Šustr. Kondolencon al ŝia familio.

---

V těchto dnech KEP rozesílá poštovní poukázky na zaplacení klubových a svazových příspěvků pro rok 1989. Zaplaťte prosím do 15.12.1988, neboť v případě včasného převodu příspěvku ČES získává klub bonus 10 % z vybrané částky pro klubovou pokladnu.

Upozorňujeme všechny členy, že dle stanov ČES člen, který nezaplatí členské příspěvky do 30. 6. běžného roku, automaticky ztrácí členství v ČES. ČES ani KEP nebudou nadále zasílat upomínky


I my máme v našich řadách hříšníky-neplatiče, kteří zapomněli splnit jednu ze základních členských povinností. Nechceme zde nikoho jmenovat, ani pranýřovat. Ti, jichž se toto upozornění týká, si mohou napsat o novou složenku na adresu KEP. V případě, že nadále nehodlají být našimi členy, jistě nám tuto skutečnost sdělí a pomohou tak upřesnit stav členské základny. Děkujeme.

Výbor.

---

S-anino Ungerová donacis al nia klubo 470.- Kčs. Ni plenkore dankas por la grandanima donaco. Ni uzos ĝin por plua progreso de nia movado.

Al ĉiuj membroj de nia klubo kaj al ĉiuj legantoj de nia Bulteno ni deziras agrablan kaj feliĉan Kristnaskon kaj konstantan prosperon kaj pacon en la Nova Jaro 1989.



BULTENO — eldonas Esperantista Klubo en Praha, baza organizaĵo de ĈEA, p.k. 1069,
111 21 Praha 1.